

# HEJES

**BULTENO DE LA HISPANA ESPERANTO - JUNULARA SEKCIO**

Nro. 15



REDAKTORO: *Sro. José M.ª Cuñat*

Novembro-Dezembro 1960

*Sto. Valseca, 32, 1.º, 2.º Barcelono (Hispanujo)*




La Kongresejo

**XIIIª Fervojista Internacia Kongreso de Esperanto**

BARCELONO - HISPANUJO

6-13 Majo 1960



## 29 literoj kontraŭ 4.000 signoj

Pli ol unu fojo vi estis vidinta libretojn tiel titolitajn: "Por lerni francan lingvon, anglan lingvon... en 7 tagoj." Sed unu temanta pri la ĉina lingvo, ne serĉu ĉar vi ne trovos ĝin.

La lernado de la ĉina lingvo, ĝis nun, estis afero de la e multoj solvi hieroglifojn aŭ de tiuj havantaj alian pli fortan kaŭzon, nome: la misiistoj.

La skribo estas la farbo de la penso, kio plenumiĝas speciale en la ĉina lingvo. Ĝiaj signoj ne estas literoj por formi parolojn, sed ĉiu uzita desegnaĵo estas la esprimo de ia unu pensaĵo.

Por scii legi mankas al ni la kono de 29 literoj. Tamen por legi ĉinan ĵurnalon estas necese koni 3.500 ideografiaĵojn, por librojn de universitata kulturo 5 aŭ 6.000 kaj por legitiujn de klasikaj aŭtoroj, 10.000.

La troa strebado postulata de la legado, klarigas la altegan ciferon, 300.000.000, de la ĉinaj analfabetoj, kiu kviva lentas la tri kvaronojn el la tuta loĝantaro de la vastegallando.

Ĝia parolado, ankaŭ prezentas grandajn malfacilaĵojn. Unu so la vorto havas plurajn sencojn, kiuj estas determinataj per la tono. Ekzistas kvartonaĵoj, oktonaĵoj, kaj eĉ plitonaĵoj. Ekzemple, la vorto "feng" nur en la unua tono povas havi la sencojn de vento, montosupro, bati, abelo, spoco da arboj, riĉe, rivero de Shensi, kvartalo de Sezchwan, elefanto, frenezulo, lanco kaj tiel plu.

Por solvi tion, la tieaj aŭtoritatuloj ĵus estas premitaj serion da efikaj rimedoj por atingi tion, enkonduki super la ceteraj dialektoj la Pekin-an kiel oficialan idiomon.

La ĉinaj signoj estos anstatuigitaj per la latina alfabeto. Tiel tekstis "La Poŝto" de UNESKO: Ekde tiu ĉi aŭtuno kelkaj el la kvindek milionoj da infanoj de la ĉinaj elementaj lernejoj eklernos novan fonetikan alfabeton.

Se la afero progresas, baldaŭ estos ĉe ni belaj diskoj por lerni ĉi tiun idiomon. Kaj se parolante, la homoj interkomuniĝas, estas atendinde plibonani alproksimiĝon inter Oriento kaj Okcidento.



XIII<sup>a</sup> FERVOJISTA INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO  
Barcelono, 6-13 Majo 1960

PROVISORA PROGRAMO

Sabato 6

- 9 h. Malfermo de la akceptejo kaj kongresejo.
- 17 h. Kunveno de LKK kaj la IFEF-estraro.
- 18 h. Terminara kunsido.
- 21 h. Interfratiĝa vespero.

Dimaco 7

- 11 h. Solena Malfermo. Vizito al Gotika Kvartalo, kaj komuna fotografado. Posttagmeze libera. Eble estos kongresanoj, kiuj deziras ĉeesti Taŭran Feston.
- 21.30 h. Vizito al la grandaj lumfontoj ĉe la Mont - juich Parko kaj Folkloro Festo en Hispana - Vilaĝo de la sama parko.

Lundo 8

- 10 h. Fakprelego, poste kunveno de la fakprelega komitato.
- 15.30 h. Redaktora kunveno.
- 17 h. Estrar-kaj delegitara kunveno.
- 21.30 h. Amuza vespero.

Mardo 9

- 10 h. Laborkunsido.
- 16 h. Rondveturado.
- 22 h. Internacia balo.

Merkredo 10

- 10 h. Laborkunsido.
- 16 h. Vizito al fabrikoj kaj riparejoj.
- 22 h. Koncerto.

Jeŭdo 11

- 8 h. Tuttaga ekskurso al Tarragona. Fermo de la kongreso.

Vendredo 12

- Matene, eventuala ekskurso aŭ vizito.
- 21 h. Enŝipiĝo de la kongresanoj, kiuj vizitos Mallorca.

La kongreso malgraŭ la Fervojista nomo ne nur estas por fervojistoj sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj kaj simpatiantoj al nia movado.

## ROCK AND ROLL

Nuntempe kelkaj moralistoj, anatemas la modernan dancon "Rock and Roll" dirante ke ĝi estas kaŭzo de la junaj malvirtoj, kaj la pretendita malbonmoreco de la nuna generacio. Mi sincere opinias ke neniam aperis en dancejoj -- ion pli sporta kaj pli naiva ol "Rock and Roll".

La dancinto de 1929, estis persono forbruligita en -- sia danco, transdonita al ĝia sorĉaĵo kaj laŭ mia kompreno, tio kio distancigas la modelon de pasinta generacio el la aktuala estas tiu senkoncernigita mieno de indeferenteco -- per kiu la hodiaŭaj gedancantoj plektas la malfacilajn zigzagojn de "Rock and Roll".

La valso estas la danco de grandaj kurbaj linioj. La tango tiu de grandaj rektaj linioj. Sed la "Rock and Roll" estas la apoteozo de la rompita linioj.

Respektinda distanco, por ke la imperiestro Francisko Jozefo ne devus mallaŭte paroli al kortega ĉambelano, a partigis la gedancantojn dum la valso.

Rilate la tangon la virino estis tute fandita kun -- sia dancinto kaj devigita sekvi certajn konvulsiojn.

Kontraŭe, dum la "Rock and Roll" la gedancantoj vivas sian izolitan kaj sendependan vivon.

La maldekstra vira mano estas kelkafoje direktilo de lia anarkia dancantino. La finalo surprizas ilin disigitaj kaj devas kunigi facilmove, por ne fini distancigitaj la entreprenon, kiun iniciatis kune. Sed la plej signifa, ne estas tiu topografia malproksimiĝo estas la neebleco -- dum la dancado de kia ajn konvercacia temo aŭ simpla demando aŭ respondo. Ne ekzistas intervalo por enmeti nek unu jeson, nek unu neon, nek unu telefonan numeron eĉ nek susuritan konsentemon por rendezuo.

Cio estas agito, traŭmo, "koktelo".

Valsoj kaj tangoj esti, laŭ asturiana kanzoneto "Diboĉado de la homoj".

La rolo de "Rock and Roll" temen estas pli multa pura.

R A P O R T I S T O

De vi mi postulas: Du sinmortigojn, unu atencon, unu merdon, unu morton pro mizero, 2-3rabojn kaj ankoraŭ kel - kajn samspecajn aferojn-diris la redaktoro.

Sed pro kio? Mi ne estas krimulo... Maksimume mi povas fari, unu sinmortigon, kaj vi volas du...Koncerne la murdojn kaj la rabojn, mi ne povas ckupi min pri ili!- diras mi, kaj tutforte ĉifas mian ĉapelon.

La redaktoro karesas sian pintan barbeton, ridetas - indulgeme kaj klarigas al mi la aferon:-Vere, oni tuj ekvidas, ke vi okupigis neniam pri similaj aferoj. Tamen vi miskomprenis min. Li komencis longan klarigon kaj mi komprenas, ke ne estas necese min mortigi, nek rabi, nek atenci; la plumo perlaboros mian panon, kaj ne la revolvero...

Mi marŝas sur la strato. Hodiaŭ mi ne havas bonŝancon.

Jam ses monatojn mi oficias kaj ĉiam liveras informojn eĉ pli ol necese, diversaj sensaciaĵoj. Tamen hodiaŭ eĉ ne la plej eta, eĉ la plej ordinara akcidento! Kvazaŭ la mondo fariĝis pli saĝa...

Ankoraŭ du horoj restas je mia dispono! Sed nenio, absolute nenio okazas! Subite mian oreilon atingas malakraj, obtuzaj sonoj. Nenia dubo! Ili estas ja revolverpafoj. Mi kuras al la loko, de kie venas la pafoj... Mi pensas: Familia sceno. La patro, ebria. La edzino insultas lin. Li fariĝas furioza, elŝovas la tirkeston el la tablo, elprenas revolveron kaj Bum!... la edzino falas.- Ho, Dio mia, -krias la bopatrino!. Bum!-ankaŭ ŝin... alkuras ankaŭ la plej aĝa filo. Bum!- falas ankaŭ li... Teruro...sango ...sensacio... Mil diabloj! Denove nenio... nur servistino - frape senpolvigas tapiŝon.

Mi iras plu. En mia poŝo mi havas nur unu levon kaj transdonas ĝin al cigana knabo, dirante: He, iru kaj vang frapu tiun knabon.! Mi elpoŝigas la notkajereton kaj atendas la rezultaton. La ciganeto frapas lin. Intervenias sinjoro, dua, tria, tuta tumulto. Kvereloj. Du homoj komencas interbati sin, kaj tiel plu. La knabo tamen subite malaperas en proksima anguleto. Ha! la friponulo. Li trompis min.

Ja vera malbonsanco ! Evidentiĝis, ke hodiaŭ nenio okazos... La redaktoro koleros. Eble li eksigos min ! Jen Goŝo revenis. Li promesis dimanĉe, nepre dimanĉe, redoni - al mi la 200 levojn, kiujn li ŝuldas al mi... per tiu mo no mi travivos, ĝis mi trovos alian laboron... Sed pro kio tioma homamaso?. Mi kuras.

Lacigita ĉevalo estas falinta. El ĝia buŝo fluas ŝaŭmo. Verŝajne ĝi mortos... Lastempe la koĉeroj laŭ sia kru eleco superis la tigrojn. Ekzemple, hodiaŭ sur strato "Ma ria Luisa" mortis ĉevalo en plej teruraj turmentoj, dank.. al... Flankenigŭ, flankeniĝu, krias la homamaso. Mi inte - rompas la skribadon kaj ĵetas rigardon. Malbeno!. La ĉevalo ekleviĝas. Kial do ĝi devis leviĝi !. Ja pli bone estus, se ĝi estus mortinta! Mi faros pluan paŝon.

-Kio okazis? ĉu sinmortigo? Atendu... Faru vojon!.

-Ĉu sinmortigo? -mi demandas servistinon.

-Jes, studento mortpafis sin-

-Brave, brave! Tio devis okazi! Tre bone li faris, - krias, mi brakumas la servistinon pro dankemo kaj kuregas supren laŭ la ŝtuparo... Mi eniras la ĉambron. La notkajere to estas en miaj manoj. Mi dispuŝas la homamason. Mia - vizaĝo lumas pri ĝojo; tamen subite miaj kruroj fleksiĝas. Mi ne sukcesas teni min staranta kaj falas sur kanapon... la sinmortiginto estas Goŝo. Goŝo, kiu morgaŭ, dimanĉe de vos redoni al mi 200 levojn. Goŝo, la ununura homo, kiu ŝuldas al mi monon. Ha, kial li ne mem mortigis sin lunde! Iu aspergas min per malvarma akvo.

-Kio okazis al vi? demandas min ploranta virineto.

-Nenio, mi svenis...

-Ĉu vi povas diri al mi kiel vi estas nomata, kian rilaton vi havas al mortinto. De kiam vi konas lin, kaj demandas min juna, bone vestita sinjoro.

-Mi estas raportisto...

-Iru la diablon kaj mi kaj vi !

HRISTO SMIRNENSKI

(Bulgara verkisto)



KORESPONDA SERVO

Nederlandino, 36-jara, petas al la hispanaj samideanaj, korespondadon pri ĉiuj ĝeneralaj temoj; lingvoj, nacia - kulturo, eduko, literaturo k.t.p. Skribu, S-ino M.G.E. Van Noort, Linnaeusiaan 91, Utrecht, (Tuindorp) NEDERLANDO.

Itala fraŭlino deziras korespondi kun knaboj kaj in- tersanĝi bildojn. Eble ŝi ĉeestos al la estonta Interna- cia Esperanta Kongreso de Barcelona. Bonvolu skribi: S-ino Adele Lugli, Voltorno 2, Nirandola, Modena, ITALUJO.

Tri italaj samideanoj deziras korespondi kun H.E.J. S-anoj, ili estas;

S-ano. Mario Amadei, Via Curtatone, Mirandola, Modena.

S-ino. Gianna Pignatti, Via Curiel, Mirandola, Modena.

Instruisto, S-ano. Veronesi Roberto, Via Cavour, Mirandola Modena.

ATENTON

La nova adreso de nia prezidanto estas la jema; Salvador Aragaj, Arxce n<sup>o</sup> 8-2-4<sup>a</sup> Cornellá (Barcelona)

La Organiza Komiziono eldonis belan kaj interesan - vinjeton, kiu taŭgas por propagandi la XIII<sup>a</sup> IFEF Kongre- son, la bela vinjeto estas tre malmultekosta do unu fo- lio (Ok glumarkoj) kostas nur 1.50 ptoj, kaj kvar folioj (kolekto) malsamkoloraj, 5 ptoj. Petu ilin IFFF Barcelo- na Termino Renfe, Barcelona.

Frue pagu vian kotizon 1961! La kotizoj estas la je- maj; infanoj 30 ptoj abonantoj 30 ptoj, junuloj 60 ptoj Sendu ilin al sinjoro, Ramón Jovani, pasaje Pujcs n<sup>o</sup> 19 Hospitalet, Barcelona, Hispanujo.

B O N A N   K R I S T N A S K O N   K A J  
F E L I C A N   N O V J A R O N  
A L   C I U J



INTERESA IDEO

Pro la ampleksigo kaj pli ofta aperigado de nia bul-  
teno ĉi-jare, ni bezonas pli da kunlaboraĵoj ol antaŭe --  
kaj estas pro tio ke mi, nome de la Redakcio petis pluraj  
samideanoj pri eventualaj kontribuaĵoj. Inter la demandin-  
toj estas nia eminenta samideano Delfi Dalmau kiu pro ega  
profesia laboro konfesis la neeblecon verki por ni artiklo-  
leton, tamen jes mi trafis de li la permeson por traduki  
aŭ represi aliajn jam publikitajn tekstojn de li.

Inter ili mi elektis la komencon de tiu aperigita o-  
kaze de la Zamenhof-Jaro, en la barcelona gazeto "Revista"  
ĉar ĝi enhavas pri D-ro. Zamenhof indikon kiu ja ne es-  
tas tre konata de la hispana samideanaro, kaj kiu precize  
rilatas Hispanujon kun la aŭtoro de la Internacia Lingvo.  
Jen do, la Komenco de tiu artikolo, esperantigita de la -  
subskribinto de ĉi tiuj linioj;

Dum ĉi tiuj decembraĵoj, pli konkrete la 15- an-  
estas celebrata la Centjara Datreveno de la naskiĝo de la  
aŭtoro de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof, ido de ju-  
da familio forpelita el Hispanujo en 1492, laŭ. Pristudo  
de unu el liaj biografiistoj Gaston Waringhien, profesoro  
de la Pariza Universitato, la fama Sobornne, tiel nomata  
ĉar ĝin fondis, speciale por teologikaj celoj, Albert de  
Sorbon, Konfesprenisto de franca Sankta Ludoviko.

Pere Julia

NOTA IMPORTANTE. - Nos satisface poder anunciar a nuestros  
samideanos que la cuota de simpatizante  
del XIII<sup>o</sup> FERVOJISTA INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO, ha  
sido fijada en 60 ptas. la cual dará derecho a asistir a  
todos sus actos. Dada la importancia de esta efeméride es-  
perantista esperamos la cooperación de todos, para así e-  
videnciar la solidaridad común en el campo internacional-  
y al mismo tiempo dar fe ante todo el mundo de cual es el  
medio más idóneo y adecuado para estudiar y resolver toda  
clase de problemas, en un mismo plano de igualdad idioma-  
tica. Gracias anticipadas.

GRUPO DE ESPERANTO "AURORO"

Para festejar el XIIIº aniversario de su fundación tuvo lugar en la mencionada entidad esperantista un agradable y amistoso vermut, al cual fueron invitados todos los grupos y sociedades esperantistas de Barcelona.

Fiesta simpática en la cual el espíritu de camaradería y hermandad de los samideanos se hizo bien patente.

Después de unas breves palabras de presentación del Sr. Vilá, tomó la batuta como amenizador el Sr. Vilella, quien con su gracejo habitual iba anunciando el desarrollo del programa, En él tomaron parte entre otros los Sres. --- March, Alberich, Castelló, quienes como cantantes y acompañados por los maestros Sres. Puig y Aragaj, interpretaron sendas composiciones operísticas y de zarzuela que fueron del agrado del numeroso público asistente. Es de mencionar el estreno de una canción titulada "Enamorada", letra y música del Sr. J. Aragay. Todos recogieron cálidos aplausos.

También cabe destacar la colaboración de la Sra. de Miñó la cual recitó sentidamente el poema zamenhofiano "La Vojo" muy aplaudido. Igualmente tomaron parte los nietecitos del Sr. Abella, quienes recitaron algunas poesías con infantil estilo. Los Sres. Vilella y Guell dedicaron también al público esperantista, una poesía cómica y otra de factura muy filosófica que causaron sensación en el ánimo de los espectadores, quienes hicieron ostensible su aprobación.

Finalmente y puestos todos en pie, se cantó el hermoso himno "La Espero" acompañados al piano como de costumbre.

Verdaderamente el acto constituyó una viva demostración de esperantismo y a la vez la prueba clara y palmaria de la fácil adaptación de la lengua internacional a toda clase de actividades intelectuales única manera de patentizar la eficacia del Esperanto en todos los terrenos.

Jaime Aragay

Aprovechamos la oportunidad para saludar, con motivo de las próximas fiestas de Navidad y de Año Nuevo, a todos los samideanos y desearles toda la felicidad y ventura posible.

La Junta.